Muŝflugilo

2022-01-04

EO: Karaj legantoj: En la unua numero de la Muŝflugilo de 2022, eblas legi pripensadon, informiĝi pri renkontiĝoj okazintaj kaj okazontaj, lokaj kaj internaciaj kaj eĉ malkovri Ŝanĝon! Ni esperas ke plaĉu al vi.

PT: Queridos leitores: No primeiro número do Muŝflugilo de 2022, poderão ler uma reflexão, informar-se sobre encontros passados e futuros, locais e internacionais e até descobrir a Ŝanĝo! Esperamos que seja do vosso agrado.

Pripensado

Kiam oni parolas pri Esperanto la deirpunkto estas per si mem kialo por granda aprezo.

Min fascinas la figuro de Zamenhof pro sia grandeco de spirito, pro la invento de la unua universala lingvo kun la celo atingi lertan komunicadon inter la laborista kaj scienca mondo, mi ankaŭ tre admiras ĉiujn kiuj daŭrigas tiun projekto, farante el ĝi realaĵon en ĉiu gimnazio aŭ malgranda lernejo.

Grava estas ankaŭ la internacia rilato kaj la intergeneracia kundivido kiuj generas sincerajn kaj konstruajn energiojn, esencajn pontojn por popoloj.

Celeste Pacheco

Z-Tago

Je la 11a de decembro okazis Z-Tago en la kooperativa librejo UNICEPE, por celebri la naskiĝtago de la kreinto de Esperato, Ludoviko Lazaro Zamenhof. La kondukantoj estis Alexandra Paz kaj Rojer Prieto, kiuj dum 4 jaroj instruadas Esperanton ĉe UNICEPE.

La evento havis tre internacian etoson: krom paroli Esperanton kaj mallonge klarigi ion en la portugala, oni ankaŭ prelegis en la galega kaj la kataluna. Por komprenigi al ĉiuj ĉeestantoj, Roger Prieto tradukis al Esperanto.

La prezidanto de UNICEPE, Rui Vaz Pinto, malfermis la eventon, rankontante la historion de UNICEPE kaj Esperantajn eventojn tie.

Galega pentristino María Xosé Ares malfermis la ekspozicion de siaj bildoj, "Feridas" (Vundoj). Ŝi uzas imagojn de la naturo por montri homajn sentojn. Dum la prezentado, ŝi rakontis pri ŝia kreado, temoj kaj koloroj, kaj legis poemojn, kiu inspiris kelkajn da ŝiaj bildoj.

Kataluna filologo Xavier Magrinyà i Minguell prezentis libron de fama kataluna aŭtoro Salvador Espriu, "La Pell de brau – La Taŭrofelo", esperantigitan de Abel Montagut. Xavier rakontis pri la libro, ĝia historia kunteksto kaj nuntempa aktualeco. Bedaŭrinde, kaŭze de teĥnikaj problemoj, la tradukisto ne povis aperi virtuale, sed ĉiuj demandoj pri la libro estis responditaj de Xavier.

Post kuna tagmanĝo, antropologo Guilherme Fians prezentis la rezultojn de sia esplorado "Esperantistoj, revoluciuloj kaj komputil-amantoj: Kiel ciferecaj teknologioj influas lingvo-lernadon kaj transliman politikan agadon". Li klarigis, kiuj estas la malsamecoj de pli aĝaj kaj pli junaj generacioj de esperantistoj kaj montris, kiel la interreto kaj modernaj teĥnologioj ŝanĝis la uzadon de Esperanto.

La Z-Tago estis fermita de la prezidanto de la Portugala Esperanto Asocio, Jozefo Martins.

Vi povas trovi la prezentadon de Guilherme Fians ĉe peertube.su/c/esperantoporto, kaj aliajn videojn ĉe la retpaĝo de UNICEPE, www.unicepe.pt. La ekspozicio "Feridas" daŭros ĝis la fino de marto, kaj vi povas vidi ĝin senpage ĉe UNICEPE. Vi ankaŭ povas mendi la libron "La Pell de brau – La Taŭrofelo" tie (la unua aro de akireblaj ekzempleroj jam estas disvendita).

- Versio de tiu artikoleto jam estis publikigita en la retejo de la Kataluna Esperanto-Asocio.

Dmitro Kuŝnaroŭ

ŜANĜO

Portu monon, portu Esperanton, portu Porton.

En oktobro, mi promenis en la placon Carlos Alberto kun du aliaj portaj esperantistoj.

Estis tie foiro kun diversaj artisanoj kaj etvendistoj. Dum miaj amikoj babilis kun konato, mi rondiris kaj okulumis la aliajn giĉojn. Ĉe unu giĉo, oni vendis diversajn ledaĵojn, inter ili monujoj. Tio efektive interesis min, ĉar mi sentis ke mia tiama monujo ne plu taŭgis, mi volis ion tre malgrandan kiu tamen ankaŭ tenu monerojn. Malgraŭ mia emo kiel vegano eviti ledon, estis io pri la monujoj kiu tiris min ĵeti pli proksiman rigardon.

Imagu mian surprizon kiam mi vidis skribite sur la giĉo la literojn "SANGO". Ĉu estas mia konscienco, riproĉante min pri la besta sufero? Ne, hodiaŭ mi ne kredos ke tiaj koincidoj portas veran signifon.

Mi proksimiĝis ĝis estus embarase, se aŭ mi aŭ la vendistoj ne parolos. Estis duopo, viro disktraktita kaj virino pli atenta, kiu kapklinis salute. "Saluton", mi diris portugale, "bonan vesperon", kaj mi proksimiĝis pli por vidi la diversajn kreitaĵojn, kiujn ili proponis.

Mi komencis per la monujo, kiu kaptis mian atenton. Estis kelkaj, en belaj klasikaj koloroj kiel kastanjo, kaj mi notis ke estis skribita sur ili la vorto "VENKO". Kurioze, mi pensis, plia esperanto vorto. Mi rigardis aliajn aferojn. Pli minimumisma monujo (kartujo, vere), kun la nomo "KARDO". Ilo por porti ŝlosilojn: "RINGO". Pasportujo: "FLUGI."

"Pardonu," mi diris, "sed ĉu vi scias, ke la nomoj de viaj produktoj estas vortoj en la internacia lingvo Esperanto?"

"Jes," respondis la virino, "tio estis intence. Ni elektis ankaŭ la nomon Ŝanĝo por nia kompanio de Esperanto." (Tiam mi komprenis, ke mi mislegis, pretertrafis la ĉapelojn sur la nomo, kaj mia konscienco pli trankviliĝis.)

"Ho, ĉu vere? Mi parolas Esperanton, kaj estas ĉi tie kun du aliaj esperantistoj." Ŝi indikis, ke ŝi neniam antaŭe renktontis iun, kiu eĉ sciis pri Esperanto aŭ rekonis la vortojn.

Tiam mi sciis, ke mi estis morale devigata aĉeti ion de ili. Mi ne povis esti la unua esperantisto, kiu trovis ilian giĉon, kaj foriri senaĉete. Kion ili pensus pri nia komunumo? "Kion vi povas diri pri la monujo?"

"Jes!" Ŝiaj okuloj montris ekscitiĝon. "Ni nomis ĝin 'Venko' ĉar ni dum longa tempo provis diversajn manierojn krei malgrandan monujon kiu tamen akceptu monerojn."

Ŝi enmanigis ekzempleron kaj malfaldis ĝin diversmaniere, por montri la spacojn por kartoj, por moneroj, por biletoj.

"Bone. Mi aĉetos unu, tabakbrunan mi petas." Kaj mi transdonis miajn eŭrojn, ricevis mian VENKON, dankis. Mi provis paroligi miajn amikojn al la vendistoj, sed komencis pluvegi. Devos esti alia tago, sed tiu tago ĝis nun ne venis.

Kaj mi efektive iom forgesis pri Ŝanĝo ĝis antaŭnelonge, kiam, dum vespermanĝo kun mia fratino, ŝi menciis, ke ŝi aĉetis tre ŝikan monujon por mia bofrato kiel juldonacon, povas akcepti monerojn, kiu estas unu el liaj bezonoj, ĉu mi volis rigardi? Imagu mian surprizon, kiam ŝi elsakigis malgrandan keston kun la vorto "ŜANĜO" (kun supersignoj), kvankam mi ja iom anticipis.

Kristnaske, kiam li malfermis la keston, estis klare ke mia VENKO ne estos la fina. Kaj mi esperas, ke ankaŭ lia ne estos.

Pli da informo pri ŜANĜO vi povas trovi ĉe sango.pt aŭ instagram.com/sango-handmadecreations. Rigardu kaj ĝuu!

Brandon Sowers

95a SATkongreso

Inter la 30a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2022, okazos en Moskvo la 95a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda kaj eblas ĝui rabaton se oni aliĝas ĝis la 15a de januaro.

La aliĝilo troveblas en la paĝaro de SAT ĉe satesperanto.org, sed bonvole avertu nin se vi planas veni kaj emas kunplani vojaĝon!

Alexandra Paz

Redakcio: Ana, Brandon, Dmitro, Nuno, Roger kaj Xana (dume)
Kontakto: esperantoporto@gmail.com

Aprenda esperanto:

Online *- www.kurso.com.br*
Presencialmente (Porto) *- www.unicepe.pt*